

Eŭropa Bulteno

Januaro 2012, Numero 112

Karaj legantoj,

Escepte mi komencas tiun ĉi numreon per informo, kiu estas iom persona, kiun mi tamen ne povas prisilenti. Nome ĝuste en la tago kiam mi finas la redaktadon de la januara numero, mi festas 50-jariĝon de mia esperantistiĝo. Por mi temas pri gravega jubileo, ĉar mia esperantista identeco signis kaj kondukis mian tutan vivon.

Kiu interesiĝas pri mia tiutema biografio, povas legi ĝin ĉe

<http://www.ipernity.com/home/pajo.zlatko>

Kaj nun: Ek al leg!

La redaktoro



NOVAĴOJ PRI EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO EN GALIVO

Ĝis la fino de januaro aliĝis al la kongreso 98 kongresanoj. Nova limdato por aliĝoj kun iom rabatita aliĝkotizom (poste kreskos la prezoj) estas la 31-a de marto.

Ne maltrafu tion. La antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj kontentige pleniĝas. Oni povas diri ke la intereso estas eĉ pli ol atendita.

Siajn kunvenojn dum la kongreso anoncis jam kelkaj fakaj asocioj: jurista, EDE, verduloj.

Maja Tišljär

NIAJ LANDAJ MOVADOJ - ESPERANTO EN NEDERLANDO

Komenco

La Esperanto-movado en Nederlando komenciĝis en 1901, kiam Dreves Uijtterdijk publikigis la unuan lernolibron. En la sekva jaro aperis la unuaj numeroj de propra gazeto: *La Holanda Pioniro*. Baldaŭ aperis ie tie lokaj Esperanto-klubo. Tamen tio ne estis la plej unua publikaĵo pri Esperanto en la nederlanda: en 1896 jam aperis en Uppsala (Svedujo) malgranda broŝuro pri la internacia lingvo, fare de Jac. M. Vaz Dias, supozeble portugala judo laŭdevene. En 1996 mi prizorgis reeldonon de tiu “Korte Brochure” por festi ties unuan jarcenton.

Tre dividita socio

Nederlando komence de la 20a jarcento estis tre dividita socio: ĉiuj tendencoj posedis proprajn memstarajn organizaĵojn, same politike, religie, sanprizorgade, sportiste ktp. Por preskaŭ ĉio ekzistis organizo socialista, katolika, ortodokse-protestanta, liberale-protestanta, ktp. Eĉ por futbalo, teatroludado, kantado, kaprobredado! Do ankaŭ por Esperanto. La lingvo povis esti idealisma, internaciisma – la lokaj grupoj estis laŭ propra etoso. En pluraj urboj interkonkurencis protestanta, katolika, socialista kaj neŭtrala movado.

Gerrit Berveling

Kresko de la movado laŭnombre inter la du mondmilitoj


En la jaroj inter la du mondmilitoj la Esperanto-movado nombre treege kreskis, ĝis kelkaj dekmiloj, ĉefe inter senlaboruloj; samtempe ankaŭ estis kelkaj seriozaj gajnoj por la Esperanto-movado: ekzemple depost la fruaj 30aj jaroj en ĉiuj telefonbudoj tra la lando la



Andreo Cheh

uzad-informoj aperis apud la NL krom en A, F, G ankaŭ en Esperanto (nuntempe telefonbudoj estas eksmodaj – ĉiu havas poŝtelefonon); kun apogo de fama pedagogo prof. Casimir kaj de Theo Thijssen, aŭtoro kaj estrarano de instruista sindikato, unu nacia ligo de instruistoj en 1931 akceptis proponon, ke oni stimulu Esperanton; la urbestro de Arnhem en 1930 havigis al Julia Isbrücker kaj Andreo Cseh por ilia Cseh-instituto bone situantan konstruaĵon por okazigi kursojn kaj konferencojn. Pastro Cseh ekloĝis nialande kaj vaste gvidis kursojn, kio certe tre kontribuis al la kreskado de la Esperanto-movado en la fruaj 30aj jaroj.

Frua literaturo



Hindrik Jan Bulthuis

Literature tre gravis tiuepoke Hindrik Jan Bulthuis, kiu verkis plurajn originalajn romanojn (plej konata estas *La Vila Mano*), kaj plurajn ofte ampleksajn tradukojn: *Leono de Flandrujo*, *Imperiestro kaj Galileano*, *Jane Eyre* ktp, kvankam la nederlandanoj ĝenerale prefere produktis kaj aĉetis multe pli da poŝvortaroj kaj kurslibroj. Kiel membroj de la Akademio de Esperanto famiĝis inĝ. J.R.G. Isbrücker (prezidanto de la reorganizita AdE 1949-63) kaj precipe Hendrik A.de Hoog (ekz aŭtoro de la lingva studaĵo *Du Malsanoj en Esperanto*) kaj Frits Faulhaber kiu aŭtoris ege detalan gramatikon nederlandlingvan *Tra la labirinto*, ankoraŭ ofte uzatan en la 60aj-70aj jaroj.

Dua Mondmilito; rekomenciĝo

En 1940 la germanaj okupantoj likvidis ĉiujn Esperanto-organizaĵojn kaj konfiskis ĉiujn iliajn posedaĵojn.

Post la Dua Mondmilito en Nederlando ĝenerale regis la etoso, ke oni devas nun rekonstrui la tutan landon – ne estas plu spaco por idealoj. Willem Drees estis la ĉefministro de la landa registaro (1948-58), sed la – ja konata – fakto ke li estis esperantisto ne multe helpis la Esperanto-movadon. Ankaŭ la fakto, ke la Cseh-Instituto plu ekzistis en Hago, ne efikis eksteren; pastoro Cseh tie loĝis ĝis maljuniĝo, fine li transloĝiĝis al flegejo por maljunuloj – la iama konstruaĵo en Arnhem dank’ al la Germana okupado kaj ne plu estis uzebla por Esperanto. Ankaŭ la transloĝiĝo al Roterdamo de UEA, post la reorganizaj klopodoj koncerne la Skismon de 1936 en la Esperanto-movado, kaj post la intermezo en Britujo, ne multe efikis en la nacia socio: Esperanton oni apenaŭ plu atentis. Sola escepto eble estas, ke la Ministerio pri Instruado oficiale akceptis Esperanton kiel libere elekteblan studofakon en la mezlernejo en 1968 en la nova t.n. Mamut-leĝo kiu revoluciis la kompletan instrusistemon nialande. Paralele al tio oni realigis ŝtatan ekzamenon pri instrukapableco pri Esperanto por la unuaj klasoj (tio funkciis pli malpli inter 1964 kaj ĉ. 1985; nova reformo nuligis la ekzamenon.)

Kunlaboro singarda

En 1958 la kvar ĉefaj esperanto-organizaĵoj nialande (neŭtrala, laboristoj, katolikoj kaj protestantoj) kune fondis komunan Esperanto-gazeton. La membronombroj malkreskis, ankaŭ sub influo de la ĝenerala socia tendenco de post la 50aj jaroj ke ĉiam pli da homoj ne emas fariĝi membroj en sociaj, politikaj aŭ ekleziaj organizaĵoj.

Tiu kunlaboro en 1994 fine rezultis en kunfandiĝo de la kvar menciitaj organizoj en la nunan “Esperanto Nederland”.

Depost 1932 la Cseh-instituto (poste Internacia Esperanto-Instituto) en Hago preskaŭ seninterrompe ĝis 1970 aperigis la revuon *La Praktiko* por internacia publiko. La lastajn jarojn UEA prizorgis ĝin. *Heroldo de Esperanto* de Teo Jung aperis en Scheveningen de 1936 ĝis 1961. Aparte vigla estis la eldonagado de la laborista movado FLE kiu kunlabore kun SAT aperigis du seriojn da literaturaj verkoj.


Ĉe la universitato

En 1947 aperis grava doktoriĝotezo de W.J.A. Manders – *Vijf kunsttalen, kompara studo pri Volapük, Esperanto, Ido, Occidental kaj Novial*. La sama Manders jam tradukis la Odiseadon komplete en prozo – por “elprovi la lingvon”. Depost 1948 la rumana prof. Sigismundo Pragano ekinstruis pri Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo; daŭrigis tiun taskon d-ro A.J. Middelkoop, d-ro Rob Moerbeek, prof. Marc van Oostendorp kaj fine prof. Wim Jansen. La lastajn jarojn finance subtenas tion kune IEI en Hago kaj Esperanto Nederland. Estas neklare ĉu eblos daŭrigi tion finance, ĉar IEI retiris sin.

Iom da nova elano

En 1972 la nederlanda eduka televida organizaĵo Teleac inter tuta serio da lingvinstruaj kursoj aperigis kurson pri Esperanto. Tra la tuta lando viglis lokaj grupetoj por subteni la kursanojn. Tamen por la landa gazetaro tio apenaŭ montriĝis novaĵo.

Kvankam laŭnombre multe malpli granda ol antaŭ la Dua Mondmilito, la Esperanto-movado nialande nuntempe literature produktas multe pli.



Gerrit Berveling

En la postmilita tempo literature agadis ĉefe Willem Verloren van Themaat (romano, poemoj, tradukoj, sed ĉefe sciencaj artikoloj), Wouter Pilger (poezio, tradukaĵoj, eldonagado), Rejna de Jong (poezio), Gerrit Berveling (redaktoro de *Monato*, redaktoro de *Fonto*; editoro de plurlandaj libroj, propraj romanetoj, poemaroj, amaso da tradukoj el Latina, Greka kaj Nederlanda) kaj Anneke Schouten-Buys (poezio).

Gerrit Berveling depost 1989 krome estas membro de la Akademio de Esperanto.

Gravaj aktivuloj

Tre grave kontribuis al la movado, ne nur loke, kelkaj homoj kiuj jam mortis: ni menciuj pri Jan van Keulen (redaktoro de *Dia Regno* de KELI), Jacques Tuinder (iniciatinto de Agado E3), Jennie van Veenendaal (iniciatinto de la junulara movado de UEA, TEJO), Ko Hammer (instruado, redaktado).

Politikistoj nuntempe kutime tute ne interesiĝas pri idealismaj movadoj. Lingve la politiko, la ministroj pri instruado kaj la universitataj gvidantoj jam decidis ĉiamaniere prioritati la uzadon de la angla. Pluraj universitatoj donas amason da kursoj angle. En la publiko la temo de lingvaj rajtoj apenaŭ vekas reagon, krom ĉe ekstreme dekstremaj naciismaj rondoj. Tamen, ni simple daŭrigas nian agadon, esperante je pli bonaj tempoj.

Organize en Nederlando krom

Esperanto-Nederland (<http://www.esperanto-nederland.nl/ned/index.php>)

ekzistas **Nederlanda Esperanto-Junularo** <http://www.esperanto-jongeren.nl/>

kaj diversaj fakaj E-sekcioj. Entute nun en Nederlando aktivas 16 E-societoj (vidu ĉe: <http://esperanto-nederland.nl/ned/regionale-groepen.php>). Kiel jam menciite krom la

organizoj de nederlandaj esperantistoj en Nederlando aktivas du gravaj sendependaj organizaĵoj: Internacia Esperanto-Instituto en Hago kaj Universala E-Asocio en Roterdamo. Ambaŭ grave influas ne nur al la tutmonda E-movado sed ankaŭ al la nederlanda. Kune kun UEA nederlandanoj organizis kelkajn universalajn kongresojn de Esperanto.

Gerrit Berveling

GRAVA EŬROPA KONFERENCO EN TRIESTO KUN ESPERANTO KIEL UNU EL LABORLINGVOJ

Eŭropa Esperanto-Unio ricevis subvencion de Eŭropa Unio el la rimedoj por Aktiva Civitaneco de Eŭropanoj por projekto organizi eŭropan konferencon pri la temo »Kia estus Eŭropo nun, se EU ne ekzistus?«. Kiel videble, la konferenco teme neniel rilatas al Esperanto, sed la organizanto aplikos reĝimon de tri laborlingvoj inter kiuj Esperanto. Pro la interesa temo EEU sukcesis varbi tre gravajn personecojn de eŭropa politiko kaj scienco kiel Eksprezidanton de Jugoslavio kaj Kroatio, Stjepan Mesić, eksprezidanton de Slovenio Milan Kučan, antaŭan estron de kristandemokrataj partioj en Eŭropa Parlamento Thomas Jansen, nobelpremiiton Reinhard Selten ktp. La konferenco celas pensigi Eŭropanojn pri la rolo de

EU en la ĝisnuna historio, aparte en la rolo konservi la pacon, pri kio eŭropanoj malmulte konscias. Tial la ĉefa celpubliko estas junaj ĵurnalistoj kaj studentoj de ĵurnalismo kiuj povos poste la rezultojn de la konferenco disvastigi en siaj landoj. Kompreneble ĝi estas malferma ankaŭ al aliaj homoj, sed aparte al esperantistoj, kiujn la temo interesas, ĉar gravas montri al la patoprenantaj gravuloj kaj ĵurnalistoj ke ekzistas ankaŭ multaj esperanto-parolantoj kiuj estas kompetentaj pri la temo kaj povas same bone uzi E-on rilate neesperantistan temon kiel aliaj uzos la du aliajn lingvojn (italan, anglan).

La konferenco okazos inter la 9-a kaj 11-a de majo en Triesto en la domo Beethoven, kie sian sidejon havas ankaŭ la loka organizanto: Triesta Esperantista Asocio. Ne estas aliĝkotizo, sed oni devas laŭeble rapide aliĝi por povi rezervi hotelĉambrojn. Ankaŭ por junaj esperantistaj ĵurnalistoj estas disponebla subvencio: la organizantoj pagos la tranoktadojn en Triesto. Jam la partoprenon en la konferenco promesis fakultatoj pri ĵurnalismo en Zagreb, Zadar, Koper, Ljubljana kaj Triesto de kie venos organizitaj neesperantistaj grupoj da studentoj gvidataj de siaj profesoroj. Por ili la konferenco estas aparte interesa, ĉar post ĉiu bloko da prelegoj estos unu-du-hora laborgrupa aktivado en kiu la studentoj disdividitaj je 4 subgrupoj simulos diversajn supozitajn situaciojn en EU kaj ludante distribuitajn rolojn evoluigos diversajn tezojn kiuj povos esti interesaj por postaj studoj. Tiuj kvar grupo uzos bedaŭrinde nur la anglan, sed rekompence funkcios ankaŭ la 5-a grupo en kiu nur Esperanto rolos kiel laborlingvo. Prelegoj estos interpretataj en du pliaj lingvoj, do se iu prelegos angle, oni interpretos en Esperanto kaj la itala.



Kunsido de la Organiza Komitato kun universitataj profesoroj en Triesto

Paralele kun la konferenco en Triesto okazois ankaŭ konferenco de Alp-Adriaj esperantistoj, kiuj povos ĝui la konferencon kaj poste partopreni en aparta programo dediĉita nur al ili. (ĝi daŭros inter la 9-a kaj 13-a de majo).

Skribu al: europaesperantounio@gmail.com (neitaloj) aŭ al noredv@teletu.it (italoj). Detalan programon vidu en la fino de la Bulteno.

Zlatko Tišljarić

EK AL LA AGADO 125!

Kiel informis Gazetaraj Komunikoj n-ro 440, la Estraro de UEA nomumis laborgrupon por la agado okaze de la 125-jariĝo de Esperanto en la jaro 2012. Jen la unua alvoko de ĝia kunordiganto Renato Corsetti.

Fakte antaŭ 125 jaroj Zamenhof presigis kaj dissendis la Unuan Libron de Esperanto kun la famaj slipetoj: Mi promesas lerni, se 10 milionoj promesos. El tiu ago sekvis grandaj rezultoj. Kion ni povas fari nun por inde festi tiun datrevenon? Mi kredas, ke ni devas fari ion similan al tio, kion faris Zamenhof.

Post 125 jaroj de seninterrompa progreso la komunikeblecoj je nia dispono estas nekompareble pli grandaj ol tiuj, pri kiuj disponis Zamenhof, sed la fido je la estonteco, pri kiu disponas ni, estas nekompareble pli malgranda ol tiu de la tempoj de Zamenhof. Kaj ankaŭ la kuraĝo pensi, ke ni po! vas ŝanĝi la mondon estas tre pli malgranda. Bonŝance ne en ĉiuj mondopartoj la etoso estas sama.

Esence la laborgrupo proponas du agadliniojn:

- ĉiu landa asocio provizu sin per reta kurso pri Esperanto en sia lingvo, kio estu integra parto de la laboro por Esperanto en tiu lando, kun landaj studgvidantoj, kiuj gvidu la lernantojn al la ekzistanta komunumo. Estas vero, ke en multaj landoj ankoraŭ funkcias relative bone ankaŭ ĉeestaj kursoj, sed ankaŭ tie oni lanĉu siajn retajn kursojn. Stefan MacGill, la prezidanto de ILEI, respondecas pri laborgrupeto, kiu pretigas novan tekston por reta kurso, la Kurso 125, sed ne atendante la aperon de la unuaj lecionoj, kiu tamen ne estas tre malproksima, vi jam komencu vidi tion, kio ekzistas aŭ ne ekzistas en via lingvo;

- ĉiu landa asocio (aŭ loka grupo aŭ alia grupiĝo) provizu sin pri respondeculo pri informado. Ni scias, ke en pluraj landoj ili ekzistas, sed ni scias ankaŭ, ke en pluraj landoj/lokoj ili ne ekzistas aŭ ne regule funkcias. En kiom da landoj, ekzemple, oni regule sendas informojn al la amas-komunikiloj? Tiu respondeculo kunlaboru kun Brian Barker, por traduki, adapti kaj dissendi enlande la gazetarajn komunikojn, kies tekstojn Brian Barker liveros. Krome li aŭ ŝi kunlaboru por ke la 26-a de julio, la Esperanto-tago en 2012, estu rimarkata de multaj, kaj espereble ankaŭ de Google.

Ĉar la laboro estos farata ne ĉefe centre sed ĉefe lande kaj loke, ni bezonas daŭran kontakton kun kiom eble plej multaj landoj. Pro tio aldoniĝis al la centra labor-grupo Adjé Adjévi, respondeca pri la agado en Afriko kaj LEE Jung-kee, same pri Azio. Ni ege bonvenigus kunordigantojn de aliaj kontinentoj aŭ landaroj.

Ĉar la labor-grupo jam eklaboris antaŭ la oficialiĝo, jam ekzistas iom da materialo, kiu montras, ke multaj landoj jam promesis kunlabori, sed ne ĉiuj por ambaŭ agadoj, kaj kelkaj entute mankas.

Do, fina alvoko: pruvu al vi mem, ke vi kapablas imiti Zamenhof-on! Kontaktu la laborgrupon kaj prezentu vin kaj la ideojn, kiujn vi volas mem realigi dum ĉi tiu jubilea jaro. Skribu al la adreso de la laborgrupo kaj vi trafos samtempe ĉiujn ĝiajn membrojn.

Nur per kunlaboro de ĉiuj ni povas esperi realigi la duonon de tio, kion realigis Zamenhof sola kaj sen komputilo.

Renato Corsetti

EŬROPA CIVITANO – NOVA RETA GAZETO

La blogo tute freŝa, klopodas raporti pri eŭropaj aferoj gravaj kaj ne tro gravaj. Ĝi okupiĝas pri politikaj, kulturaj aferoj kaj kelfoje rememorigas pri eventoj el la pasinteco.

Eŭropa Civitano

Ĉar ni vivas kune en Eŭropo...

La celo estas ekirigi paĝon esperanlingvan por informi la esperantistaron ne pri Esperanto, sed pri la aferoj, kiuj kroĉiĝas al Eŭropo, al la eŭropaj homoj. Kiel estas kutimo en la esperanta mondo, ankaŭ tiu ĉi paĝo estas senprofita, memstara entrepreno, kies redaktoro estas memkompreneble neprofesiulo. La titolo de paĝaro fariĝis ankaŭ pseŭdonomo por la redaktoro, ĉar laŭ lia opinio estas grava la temo, ne la skribanto.

<http://europacivitano.wordpress.com/>

J-K Rinaldo de Padova

INFORMADO EN BRITIO EN 2011

Dum la lastaj du jaroj en Britio estas ege forta interesiĝo de publikaj medioj pri Esperanto. Estas granda listo pri plurdek artikoloj. Tre grandan propagandon prezentis la jena kviz-elsendo en BBC:

<http://www.youtube.com/watch?v=6HsA8D6cPZU&context=C31bd0c3AD0EgsToPDskJ3S WQnbnSkSU9bTAVBLgis>

Esperanto iĝis 125-jara en 2012 kaj tio donos pliajn ebelcojn por informado. Ĉiuj kiuj volas helpi nin rilate popularigon de la lingvo aliĝu al la brita kongreso en Edinburgh.

Brian Barker

LA JARO DE TIBOR SEKELJ



En Maribor (Slovenio) startos la prifesto de la Jaro de Tibor Sekelj precize en la tago de lia naskiĝo la 14-an de februaro, kiam okazos en solena salono de la malnova urbodomo Rotovž ronda tablo pri Tibor Sekelj. Pri li parolos bonaj konantoj de tiu grava esploristo, verkisto kaj esperantisto Zlatko Tišljar, Spomenka Štimec, lia lasta edzino Ersebet Sekelj kaj Zdenka Rojc.

La ronda tablo estos publika por la civitanoj de Maribor.

Mario Vetrh

ZAMENHOF- KAJ KRISTNASKFESTOJ EN OOSTENDE

La 25-an de decembro esperantistoj celebris la meson je Kristnasktago kaj ĝojis ke esperantistoj venis el pluraj belgaj urboj, eĉ el Nederlando. La kapelo estis plenplena kaj "nia" Patro misiisto Martin estis tre feliĉa pri tiu bela multkultura ceremonio. Ĝi estis parto de la Zamenhoffesto.



La 11-an de decembro ni prifestis Zamenhoftagon. Antaŭ la komenco ni estis tre honorigitaj per la vizito de nia urbestro Jean Vandecasteele kiu venis gratuli nin okaze de tiu festo.

35 geamikoj venis el pluraj belgaj urboj kaj eĉ el Norda Francio. Mi profitis la okazon por paroli pri la venonta EEU-kongreso en Galivo (Irlando). Kaj dum la manĝo mi ankaŭ prezentis la projekton "Springboard2Languages" kiun ni enkondukos ĉe la "Fondaĵo Reĝo Baudouin". Finfine ni kune kantis la

Eŭropan Himnon (de Umberto Broccatelli).

Pri la pli "sprita" parto zorgis nia prezidanto Marc Cuffez kiu gvidis amuzan kvizon. Laŭ la reagoj de la partoprenantoj ni opinias ke ĉiuj estis tre kontentaj iomete "ferii" ĉe la marbordo, des pli ke nia klubejo situas en la centro de Oostende. Tutapude estas nuntempe granda glaciejo kaj kristnaskmerkato.

Flory Witdoeckt

FONDAĴO CIGNO

La 11-an de januaro estis kreita en la urbo Higashikagawa la Fondaĵo 'Cigno' kun la celo premii la informan agadon de Landa Asocio en la Eŭropa Unio, kiu plej elstaris tiukampe dum la periodo de unu kalendara jaro.

Prezidas ĝin S-ino Ayako Kawakita. La fondaĵo naskiĝis dank'al la malavara kontribuo de ŝia patro, la japana mecenato Etsuo Miyoshi. Antaŭ 16 jaroj li kreis Cigno Premion por subteni la agadon por Esperanto en la tria mondo kaj ekssocialismaj landoj. De 2012 la premio ne plu estos aljuĝita kaj anstataŭe Fondaĵo Cigno agados por premii la informan agadon en la 27 landoj de EU.

La unuan premion oni aljuĝos pro la laboro farita en la daŭro de la jaro 2011.

Ni invitas, do, la EU-Landajn Asociojn partopreni en ĉi tiu konkurson per sendado al nia adreso de raporto pri sia agado kune kun kopioj de la gazetaraj informoj, son- kaj filmdosieroj ĝis plej malfrue la 15-an de marto 2012. La rezulto estos rekte informita al la gajnanto kaj diskonigita pere de la E-gazetaro la 1-an de junio 2012.

La premio konsistos el mono (la egalvaloron de JPY 200,000, kio nuntempe estas proksimume EUR 2,000) kaj diplomo. Ĉilasta estos transdonita kadre de la Universala Kongreso en Hanojo.

La informojn bv sendi al la jena adreso:

S-ino Ayako Kawakita

Swany Corp.

981 Matsubara

Higashikagawa 769-2795

Japanio

yaasaa-k4691@md.pikara.ne.jp

Kun koraj salutoj kaj bondeziroj okaze de la Zamehof-Tago,

Ayako Kawakita

PREZIDANTO DE EEU INTERVJUITA DE ARD – GERMANA RADIO

La germana ĵurnalisto Martin Bohne intervjuis la 11-an de decembro pri lingvaj problemoj en Eŭropa Unio la prezidanton de EEU Seán Ó Riain por centra germana radio: ARD German Radio. La intervjuo daŭris dek minutojn inkluzive de la fine kantata eŭropa homno. La intervjuo estis elsendita en la radio la 9-an de januaro 2012.

Seán Ó Riain

LECH WAŁĘSA EN JUNULARA ESPERANTO-SEMAJNO okazinta en Gdańsk ĉirkaŭ la jarŝanĝo



En la tria tago, en la mateno, ni havis maloftan ŝancon. Ni havis renkontiĝon kun la eksa prezidento de Pollando, Lech Wałęsa. El la pola interpretis Irek Bobrzak. Wałęsa kunfondis Solidarecon, la unuan sendependan sindikaton en la landoj de la sovetia bloko, kaj li gajnis la Nobelan pacpremion. Ni iom timis, ke iĝos nur monologo, sed ĉefe estis serio de demandoj kaj respondoj, kiun li enkondukis dirante, ke lin plej interesas la akraj demandoj. La demandoj temis pri ĉio ekde demokratio ĝis reformo de kopirajto,

la Okupu!-movado, la protestoj en Rusio kaj tiel plu. Estis ankaŭ demandoj pri la rolo kiun havis komunismo en Pollando. Estas tre agrable, ke Esperanto foje donas aliron al tiaj interesaj homoj!

Chuck Smith

ESPERANTO EN UNIVERSITATOJ

Lau la informo de sinjoro Germain Pirlot (kiu regule kompletigas kaj akzualigas la liston) en januaro 2012 ekzistas en la mondo ebtute 50 univeritatoj en kiuj Esperanto havas iun formon de oficiala statuso : de libere elekteblaj kursoj, partoj de lingvistikaj studoj ghis studoj kiuj donas diplomon de instruisto.

Temas pri universitatoj en 19 landoj el inter kiuj dek (se oni konsideras ankaŭ Kroatio) estas en Europa Unio. Jen la statistiko pli detala :

Nombro laŭlande:

Brazilo: 5, Bulgario: 1, Ĉinio: 6, Germanio: 3, Hispanio: 1, Hungario: 2, Italio: 1, Japanio: 5, Korea Respubliko: 4, Kostariko: 1, Kroatio: 1, Litovio: 1, Madagaskaro: 1, Meksiko: 6, Nederlando: 1, Pollando: 6, Rusio: 3, Slovenio: 1, Usono: 2

Sume: 51

Landoj: 19

Zlatko Tišljarić

INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO EN CERVIA DUM PASKO 2012



IJF, junulara renkontiĝo organizata de IEJ okazos de la 4a ĝis la 10a de aprilo en Cervia, ĉe la Adriatika Maro, preskaŭ plaĝe.

Ni vin invitas amikumi kaj amuziĝi en junulara, internacia mara etoso sed krom trinkejo kaj gufujo estos ankaŭ programo kun temo

<http://iej.esperanto.it/ijf/2012/temo.eo.php> "Novaj lingvaĵoj por novaj komunikiloj: de Leibniz al Zuckerberg, tra Turing", koncertoj, ekskursoj kaj... vi! :)

Eblas aliĝi ĉe:

<http://iej.esperanto.it/ijf/2012/index.eo.php>><http://iej.esperanto.it/ijf/2012/index.eo.php>

Cetere estas IJF-fonduso por ebligi senpagan memzorgan partoprenon al homoj el malfacilaj ekonomiaj kondiĉoj:

<http://iej.esperanto.it/ijf/2012/ijfonduso.eo.php>><http://iej.esperanto.it/ijf/2012/ijfonduso.eo.php>

Eblas kandidatiĝi ĝis la 31a de januaro!

La IJF-teamo

ILEI KAJ IFEF TROVAS KOMUNAN TERENON POR KUNLABORI

ILEI starigas kunlaboron kun IFEF (la Internacia Fervojistista Esperanto-Federacio), kadre de ties 64a Kongreso, kiu okazos en Herzberg, la Esperanto-urbo inter la 19a kaj 25a de majo, 2012. Post traktoj en Herzberg tra la novjaro, estas konsentite, ke ILEI ofertas nov-specan programeron nausesian seminarion pri la arto kaj ebloj instrui Esperanton en fervojistaj rondoj. Ghi celas instruistojn kaj kursgvidantojn (au ontojn), ne nepre fervojistajn. Ghi prezentos la utilon krei novajn didaktikajn shtuparojn, surbaze de la unikaj bezonoj kaj potencialoj de la lingvo mem; tio estas uzi verbocentran aliron, kun forta atento al la (ne)transitiveco. La seminarianoj trastudos skemon por krea kursa kun moderna kaj fervojista enhavo, bazita sur la didaktika shtuparo uzata por la paralele pretigata jubilea kurso. Estos tempo por seminarianoj intershanghi instruspertojn, diskuti jubileajn planojn kaj varbagadojn, kune kun tasketo prepari en paroj kvin-minutajn modellecionojn.

La tri-taga kurso antaŭvideble komencighos en sabato, la 19an de majo, ekde la 15a horo (2 sesioj), kun tri pliaj horoj dimanĉe kaj kvar lunde. Ghin gvidos la prezidanto de ILEI, Stefan MacGill. La kosto por la seminario kaj ghiaj presitaj materialoj estos 10 euroj por alighintoj al la IFEF-kongreso kaj 20 euroj por nealighintoj, pageblaj surloke. Atestilojn pri partopreno ricevos chiu kiu cheestas chiujn sesiojn. La seminaria programo kaj superrigardo de la etapoj de la fervoja kurso estos videblaj en la retejoj de ILEI kaj la Kongreso.

Pliaj informoj pri la Kongreso che: http://esperanto-urbo.de/_ifk64_/page.php?pid=87502790

PROVIZORA PROGRAMO DE LA KONFERENCO KIEL ASPEKTUS EŬROPO SE EU NENIAM ESTUS FONDITA

Triesto, 09.05.2012-11.05.2012

Lingva reĝimo: Plenkunvenoj estos en tri lingvoj (angla, esperanto kaj itala) (kiam iu parolos angle, la interpretistoj interpretos en la itala kaj esperanto ktp.). Dum la prelegoj estos uzataj nur du lingvoj (la angla kaj Esperanto krom prelego de Mesić kiu parolos kroate kaj okazos tradukoj al la itala kaj la angla kaj la prelego de Kučan kiu parolos en la slovena kaj la tradukoj okazos al la itala kaj la angla). La laboro en laborejoj estos sen interpretado: unulingva. 4 studentaj laborejoj estos en la angla kaj unu poresperantista en Esperanto.

9-a de majo, merkredo

11,00 – 12,00: Konferenco por italaj ĵurnalistoj

15,00 – 16,00: Solena Malfermo:

paroladetoj de dommastroj: regiona, urba, ĵurnalista, universitata, partnera TEA
enkonduka parolo de Seán Ó Riain, prezidanto de EEU
kanto de eŭropa himno en Esperanto

Historia bloko

16,00-16,20 Thomas Jansen (iama ĝenerala sekretario de Eŭropa popola partio - kunligo de kristandemokratiaj kaj konservativaj partioj en EU) prelegas kadre de la historia bloko

16,20-16,30 demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

16,30-16,50: Božo Repe (profesoro pri historio en Ljubljana) prelegas kadre de la historia bloko

16,50-17,00: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

17,00-17,30: kafopaŭzo

17,30-18,15: diskuto pri historia perspektivo de EU

18,15-20,00: **Laborejoj por partoprenantoj** (ĉefe junaj ĵurnalistoj kaj studentoj de ĵurnalismo, sed ankaŭ partoprenantaj esperantistoj) pri la historiaj aspektoj de la ĉeftemo



Salono Beethoven, via Coroneo 15, Triesto

10-a de majo, ĵaŭdo

Politika bloko:

9,30-9,50: Stjepan Mesić, iama prezidanto de Jugoslavio kaj Kroatio, prelegas pri politikaj aspektoj de la ĉeftemo

9,50-10,00: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,00-10,20: Milan Kučan, iama prezidanto de Slovenio, prelegas pri la politikaj aspektoj de la ĉeftemo (ne ankoraŭ konfirmita) – kaze de nekonfirmo estos elektita iu alia preleganto

10,20-10,30: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,30-10,50: Itala Politika Rezentanto

10,50-11,00: demandoj kaj respondoj

11,00-12,30: Aliaj prelegantoj (Giorgio Novello, Margareta Handzlik,...)

Sekvas: diskuto pri politika perspektivo de EU

12,30-14,00: tagmanĝa paŭzo

14,00-15,30: **laborejoj por partoprenantoj** pri la politikaj aspektoj de la ĉeftemo

Ekonomia bloko:

15,30-15,50: Reinhard Selten, nobelpremiito por ekonomio el Germanio, prelegas pri ekonomiaj aspektoj de la ĉeftemo

15,50-16,00: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

16,00-16,20: Francois Grin, svisa universitata profesoro prelegas pri ekonomiaj aspektoj de la ĉeftemo

16,20-16,30: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

16,30-17,00: kafopauzo


17,00-17,20: Mladen Staničić, ekonomika fakulo el Kroatio, prelegas pri la ekonomiaj aspektoj de la ĉeftemo

17,20-17,30: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

17,30-18,30: diskuto pri ekonomia perspektivo de EU

18,00-19,00: Publika Ronda tablo por Triesta publiko kun la eksaj prezidantoj Mesić kaj Kučan kaj Margareta Handzlik kaj Thomas Jansen pri la graveco de EU por konservo de la paco en Eŭropo kaj la mondo – EKSTER LA PROGRAMO POR LA PARTOPRENANTOJ kaj en alia loko.

18,30-20,00: **laborejoj por partoprenantoj** pri ekonomiaj aspektoj



11-an de majo, vendredo

Aliaj prelegoj

9,00-9,20: prof. Paolo Alessi, Prezidanto de Centro Unesco de Triesto

»Eŭropo kaj problemoj de handikapitoj«

9,20-9,40: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

9,40 -10,00: Zlatko Tišljarić prelegas pri identeca karaktero de lingvoj
10,00-10,10: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,10-10,30: Iu el ne ankoraŭ fiksitaj prelegantoj
10,30-10,40: demandoj kaj respondoj rilate la prelegon

10,40-11,10: kafopauzo

11,10 -12,00: Eventualaj aliaj prelegantoj

12,00-13,30: Ferma plenkusido pri la konkludoj de la konferenco: parolado de Seán Ó Riain pri la konferenco kaj konkludoj, diskuto kaj akcepto de la konkludoj, eventualaj intervenoj de homoj intertempe aliĝontaj kaj gravaj, kanto de eŭropa himno, fermo de la konferenco

LABOREJOJ POR STUDENTOJ

(I-a laborejo merkredon de la 18,15-20,00; II-a laborejo ĵaŭdon de la 14,00-15,30 kaj la III-a laborejo ĵaŭdon de la 18,30-20,00 h) estos organizitaj sekvamaniere:

Studentoj estos dividitaj je 4 grupoj kun maksimume 20 partoprenantoj tiel ke en ĉiu grupo estu studentoj el ĉiuj ĉeestantaj universitatoj. Ĉiun laborejon gvidos (moderacios) profesoro de iu el la fakultatoj kiuj organizos alvenon de studentgrupoj (Zadar, Zagreb, Koper, Ljubljana, Trieste...). Ĉar ekzistas tri planitaj periodoj por la laborejoj kaj dum ĉiu el ili formiĝos 4 grupoj, entute estos 12 laborejoj.

La laborejoj estos organizitaj en la formo de simulado de situacioj, en kiuj la partoprenantoj ludos difinitajn rolojn. Jen ekzemploj:

I. Laborejoj post la bloko da prelegoj pri historiaj aspektoj de la temo:

Grupo A: Simulado de situacio: Armea stabo de EU serĉas solvon por konflikto inter Turkio kaj Grekio, kiu danĝere eskalaciis

Grupo B: Simulado de situacio: Franca registaro serĉas strategion por solvi problemojn de malkontentaj junaj araboj post la ribelo en kiu ili bruligadis aŭtomobilojn en urboj

Grupo C: ?

Grupo D: ?

II. Laborejoj post la bloko da prelegoj pri politikaj aspektoj de la temo:

Grupo A: Simulado de konferenco por ĵurnalistoj: Prezidanto de EU respondas al demandoj de la ĵurnalistoj pri la problemoj kiam iu demokratie elektita registaro akceptas konstitucion en iu EU-lando kiu kontraŭas la bazajn valorojn, principojn kaj traktatojn de EU.

Grupo B: Simulado de situacio: En iu loko diskutas kondiĉoj inter kiuj estas kelkaj tute neinteresitaj pri politiko kaj iuj flume konvinkitaj diskutantoj kiel decidi en referendumo POR aŭ KONTRAŬ eniro de sia lando al EU.

Grupo C: ?

Grupo D: ?

III. Laborejoj post la prelegoj pri ekonomiaj aspektoj de la temo:

Grupo A: Simulado de situacio: Ekonomikistoj analizas ekonomian staton de Italio en la jaro 2000 en supozita situacio ke neniam estis fondita EU kaj do, ke Italio ne estas en EU.

Grupo B: Simulado de situacio: Komisiono por ekonomiaj demandoj de Eŭropa Parlamento serĉas strategion por ekonomiaj rilatoj kun Ĉinio

Grupo C: Simulado de konferenco por ĵurnalistoj: Membro de Eŭropa Komisiono respondas al demandoj de ĵurnalistoj pri la reguloj kaj praktiko de la uzo de laborlingvoj en institucioj de EU, pri ekonomiaj aspektoj de multlingveco kaj lingva problemo en EU

Grupo D: ?

En la laborejo en Esperanto oni diskutos pri la prelegoj de la tuta bloko.

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 25-an de decembro 2011

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Gerrit Berveling, Zlatko Tišljar, Seán Ó Riain, Flory Witdoeckt, Maja Tišljar, J-K Rinaldo de Padova, Brian Barker, Renato Corsetti, Mario Vetrih, Ayako Kawakita, Chuck Smith

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

